



Unum ovile et unus pastor.
Unu ŝafejo kaj unu paŝtato.
(JOH., X, 16.)

ESPERO KATOLIKA

INTERNACIA MONATA GAZETO, OFICIALA ORGANO de I. K. U. E.

V-a Kongreso kaj Pilgrimo de la
Katolikaj Esperantistoj en Lourdes.
(12–17 Aŭgusto 1914).

*Sub la Honora Prezido de L. Episkopa Moŝto Mons. Schoepfer,
Episkopo de Tarbes kaj Lourdes.*

Letero de S-ro CL. COLAS.

LOURDES, 20-an de Januaro 1914.

*Kara Prezidanto de I. K. U. E.,
Karaj gefratoj en Kristo,*

Jen mi venis, laŭ mia promeso, en la urbon de la Sankta Virgulino, por pristudi kaj prepari la programon de nia V-a Kongreso kaj Pilgrimo.

Nune, ĉio estas trankvila kaj silenta sur tiuj sanktaj montoj, kie, ĉiujare, resonas la voĉoj de centoj da miloj de ĉiunaciaj kristanoj, kantantaj la gloron de ilia ĉiela patrino.

Tavolo da neĝo, blanka kiel la robo de Nia Sinjorino, surkovras la monton. Sed, tamen, Lourdes neniun perdis dum vintro el siaj senkomparaj ĉarmo.

Senĉese, en la groto benita, kie Mario sin montris, bruladas miloj da kandeloj, preĝadas piaj personoj, fluadas la miraklaj akvoj, pendadas centoj kaj centoj da bastonoj, da apogiloj, da ĉiuspecaj kurac-aparatoj, lasitaj kiel atestoj de miraklaj resaniĝoj.

Kiel ĝojega mi estas, kara Prezidanto, ke ni elektis Lourdes kiel kongresurbon! Kiel certa mi estas, ke la Sankta Virgulino mem inspiris al ni tiun elekton, kaj deziras, ke ni laŭdu ŝin per nia bela Esperanto, — ke ni kantu en nia lingvo ŝian Senmakulan Konceptcion, — ke ni ankaŭ plenumu la profetan parolon: „*Ĉiuj generacioj nomos min feliĉa! . . .*”

Veninte ĉi-tien por prepari nian pilgrim-kongreson, mia unua klopodo estis, kompreneble, apud la Sankta Virgulino mem. Surgenuiĝinta en la sankta groto, mi petis, ke Ŝi benu nian entreprenon, kaj sukcesigu miajn klopodojn. Kaj ŝi mirinde helpis al mi!

Unue, la Episkopo de Lourdes, Lia Moŝto Monsinjoro SCHOEPFER, afablege min akceptis, kaj promesis „ke li estas preta fari ĉion eblan por helpi al ni”. Li mem donis al mi praktikajn konsilojn por la aranĝo de nia pilgrim-kongreso. Li bonvolas esti nia Honora Prezidanto, kaj promesis ĉeesti nian malferman kunvenon. Fine, li diris al mi, ke la katolikaj Esperantistoj havos sian oficialan lokon en la solenaj procesioj, kun sia standardo, kaj la uzado de Esperanto en la kantado de kantikoj.

Aliparte, S-ro Paroĥestro de Lourdes, metas je nia dispono por niaj kunsidoj la kunvenejojn de sia paroĥo, kie jam kongresoj okazis.

Fine, estos permesate al ni, gravurigi sur marmaro en la baziliko de Lourdes, por la estontaj generacioj, la memoron de nia kongreso, kaj donaci, Esperantan standardon, por pendigi inter la ĉiunaciaj flagoj kaj banderoj, kiuj ornamas la bazilikon.

Kiel vi vidas, tre kara Prezidanto, kaj karaj samreligi-anoj, la invito de la Sankta Virgulino en Lourdes estas plena de belaj promesoj.

El kio nun dependas la sukceso? El ni mem. Jes! el ni,

esperantistoj de ĉiuj nacioj! Ju pli multope kaj pie ni venos ĉi-tien, despli belega kaj sukcesa estos nia kongreso.

Venu do multope, karaj amikoj de ĉiuj nacioj! Venu, gekatolikoj francaj, hispanaj, germanaj, anglaj, nederlandaj, belgaj, irlandaj, k. t. p.

Venu ankaŭ vi, ni kore vin invitas, kristanaj fratoj, kiuj ne ankoraŭ apartenas al la Roma ŝafaro. Se vi ankoraŭ dubas, ke Nia Sinjoro delegas sian potencon al la Sankta Virgulino por mirakle resanigi nekuraceblajn malsanojn, venu, al Lourdes!

Hodiaŭ mem, mi longe parolis kun juna persono F-ino J. GIRAUD, el Bordeaux, kiu, post longa, terurega malsano (dum dek-kvar jaroj!) absolute nekuracebla per sciencaj rimedoj (tuberklozo de la ostoj, nomita Pott' malsano) estis mirakle kaj subite resanigita en Lourdes (Aŭgusto 1911), la tagon mem kiam, laŭ la opinio de ŝiaj kuracistoj, ŝi devis morti.

Malgraŭ, ke ŝi estis mortanta, ŝi volis, ke oni ŝin konduku, por la sesa fojo, en Lourdes.

Ŝi estis etendita sur sia lito dum la procesio de la Sankta Sakramento. Dum oni alproksimigis la Sanktan Sakramenton, por ĝin tuŝigi de la malsanulino, iu protestanta Doktoro, kiu ŝin konadis, ekkriis ironie: „Se estas Dio en tiu ostensorio, estu do resanigita tiu junulino!” Samtempe, la junulino leviĝis, plene rasanigita, kaj neniam de tiu momento, tiu junulino, kiu *dum dekkvar jaroj*, estis pli mortinta ol vivanta. — suferis eĉ la plej malgrandan malsanon. La doktoro kaj germana fraŭlino tuj konvertiĝis. Jen unu el la mirindaĵoj de Lourdes.

Ho! karaj amikoj, venu, venu pocentoj en Aŭgusto al la groto de Massabielle, al la „lando de mirakloj!”

Sed, krom tiuj multaj motivoj, kiuj devas nin altiri ĉi-tien, ĉu ne estas ankoraŭ alia motivo?

En Lourdes mem mortis la pia fondinto de nia movado la kara Abato Peltier; en Lourdes ripozas lia korpo; kaj ankaŭ pian pilgrimon ni devas fari al lia tombo.

PRAKTIKAJ INFORMOJ.

Dato. — La kongreso daŭros de la 12-a ĝis 16-a de Aŭgusto inkluzive. La kongresanoj ĉeestintaj la Dekan universalan kongreson en Parizo, foriros kune la dimanĉon 10-an, je la horo 22, kaj alvenos en Lourdes la morgaŭon, tagmeze. La kongreso finiĝos la 16-an tagmeze.

Loĝado. — Miaj klopodoj rilate al tiu punkto estis sufiĉe malfacilaj: en ĉiuj hoteloj, pro la alfluo de ĉiunaciaj pilgrimuloj kaj turistoj okaze de la Asumpto, oni postulas *terurajn prezojn*. Ĉar ni nepre, por igi nian kunvenon vere agrabla, devas esti *ĉiuj kune* (tio estas absoluta kondiĉo de sukceso por *niaj kongresoj*) mi devis min turni, — sen pero de agentoj, kiuj „plumas” la pilgrimantojn! — al grandaj hoteloj. Mi fine trovis tri, kiuj proponis tre kontentigajn kondiĉojn, kaj la tuta 5-taga ĉeesto en Lourdes ne kostos al ĉiu pli ol *14 Sm.* (fr. 35) por ordinara klaso, kaj *16 Sm.* (fr. 40) por unua klaso. La komitato elektos unu el tiuj tri hoteloj laŭ la nombro de la kongresanoj. Mi povas absolute certigi pri la komforteco de tiuj hoteloj.

Pli detalajn sciigojn, pri la menuo, k. t. p. ni baldaŭ konigos. Plue mi obtenis rabatojn por vizito de la „*panorama de Lourdes en la tempo de la aparicioj*”, la eniro de „*grotoj de la Reĝo*” k. t. p.

Programo. — Ĉiutage okazos *matene* kaj *tagmeze* labor-kunsido. Plue, ni partoprenos grupe la ekzercojn de la pilgrimoj, kaj la famekonatajn kaj kortuŝantajn pilgrim-procesiojn: procesio de la malsanuloj je la 4-a posttagmeze; procesio kun kandeloj, je la noktiĝo.

Rilate al la temoj traktotaj en laborkunsidoj, la komitato de I. K. U. E. decidos baldaŭ.

Floraj Ludoj. — Por la unua foje en la mondo, oni vidos en Lourdes „*Katolikajn Florajn Ludojn*”. (Baldaŭ ankaŭ aperos la regularo pri tiu literatura kaj pia konkurso).

La temo traktota kaj premiota estos „*la Sankta Virgulinino*”. Premioj estos solene disdonitaj en Lourdes al tiuj kiuj traktos plej bele en Esperanta *poezio* aŭ *prozo*. (Eble episkopo mem prezidos la solenan disdonon de premioj).

Ekskursoj. — La kutimajn ekskursojn, kiujn faras ĉiuj pilgrimantoj, ni faros ankaŭ: al grotoj de la Reĝo, kaj al preĝejo de Betharam.

La 17-an, t. e. post la fermo de la kongreso, okazos laŭvola kaj *eksterkongresa* ekskurso al „Cirque de Gavarnie”, la plej bela natura mirindaĵo en la Pireneoj. (Proksimuma kosto, enkalkulante aŭtomobilojn kaj vivadon: 15 frankojn).

Kongreslibro. — La komitato intencas eldoni „kongreslibron”, kiu estos donata al ĉiu aliĝinto.

Kongres-gazeto. — Mi komencis klopodojn, por ke aperu, dum la kongreso, Esperanta eldono de la *Journal de la Grotte*, oficiala organo de la Sanktejo de Lourdes.

Aliĝoj. — Post diversaj pristudoj, ni decidis ne postuli pli altan kotizon ol kutime: 2 *Sm.* po persono. Kiam, en la *sama familio* aliĝos pli ol tri membroj, la *3-a kaj sekvantaj* pagos nur 1 *Sm.* por la membrokarto.

Oni nepre sendu *plej baldaŭ* sian kotizon al nia kongreskasistino F-ino Larroche, 55, rue de Vaugirard, Paris.

Oni povas ankaŭ sendi al ŝi *laŭvolan mondonacon por gravurado de memorskribaĵo en la baziliko de Lourdes, kaj aĉeto de standardo por lasi en la sanktejo.*

Dio kaj la Sankta Virgulino benu kaj sukcesigu nian V-an kongreson!

Notoj pri Lourdes

la lando de mirakloj.

Daŭrigo.

II.

Situacio kaj ĝenerala aspekto.

Lourdes, 7.000 loĝantoj, fama pro ĝia pilgrimejo, estas la ĉefurbo kantona de la departemento „Hautes-Pyrénées” (Altaj Pireneoj) kaj la sido de la civila juĝejo de la distrikto „Argelès”. Lourdes staras sur bordoj de torento france nomita: „Le Gave de Pan”. En la Pireneaj landoj ĉiuj torentoj estas tiel nomitaj: „gave”.

Lourdes estas je 858 kilometroj de Parizo. Ĝi kuŝas en unu malgranda ebenaĵo, ĉirkaŭata sudoriente per la pintmonto „le Jer”, kiu prezentas du akrajn pintojn, la granda „Jer” (950 metroj) kaj la malgranda „Jer” (650 metroj); ankaŭ per la torento, kiu banas la bazojn de la „Béout”, kiu havas ankaŭ du pintoj, unu da 792 metroj, alia da 478. La „Béout” sin apogas sur la ŝtonegon „Spéluges”, kiu mem havas kiel franka monto la „Massabielle’an” ŝtonegon.

Lourdes havas fortikaĵon konstruitan sur abrupta ŝtonego. La kastelo dividas la urbon en du partoj; oriente la antikva urbo, okcidente la nova urbo. Ĉe la bordoj de la torento staras la groto, kie okazis la aperoj de la Senmakulino, la supera baziliko, kaj la preĝejo de la Rosario antaŭata per la vasta duoncirko kaj la belega esplanado destinata por la procesio.

III.

Historio.

Sendube Lourdes ŝuldas sian komencon al sia kastelo. Laŭ la legendo, Karlomagno okupis tiun kastelon, nomita en tiu epoko „Mirambel” (latine *Mirabilis* = bela vidaĵo) kaj aparteninta al Mira, araba princo. Dum la sieĝo de la Kastelo, aglo subite aperis sur la plej alta turo de la fortikaĵo kaj en ĝi lasis fali fiŝon. La emiro sendis al Karlo-magno la fiŝon kaj dirigis al li, ke li ne estas tute

senigita je nutraĵoj, ĉar li kaptis similajn fiŝojn en sia fiŝreservujo. Li tamen kapitulaciis kaj konvertiĝis. Cedante la Kastelon, la emiro kondiĉis, raportas la Kroniko, ke li, fariĝante Kavaliro de Nia Sinjorino, la Dipatrino, volis ke sia graflando, tute liberigita el feŭdo tera, nur dependu de Ŝi. Estas pro tiu tradicio, ke la kastelo estis nomita: Lordes aŭ Lourdes. Insignoj de la urbo rememorigas la legendon de la aglo kaj de la fiŝo.

Dum la mezepoko, la kastelo de Lourdes estis centro de teruro por la ĉirkaŭa lando. Foje en la nomo de anglano, foje en la nomo de grafoj de Bigorre, ĝi estis okupita de kapitanoj-rabistoj, kiuj perforte elŝtelis produktaĵojn de la ebenokupantoj, ĝis kvardek aŭ kvindek mejloj ĉirkaŭronde.

Je dekoka jarcento, kastelo de Lourdes fariĝis ŝtata malliberejo. Dum tiuj lastaj tempoj taĉmento artileria okupis ĝin. Depost oni organizis muzeon en ĝi.

(*Daŭrigota.*)

Max ROUB.

La Abato¹⁾ de Caldey, konvertita.

De Caldey al Monte Cassino.

Ni donas ĉi sube kelkajn eltiraĵojn el la leteroj de Dom Aelred Carlyle O.S.B., (la antaŭa, kaj ankaŭ la baldaŭa Abato de Caldey) leteroj skribitaj el Romo dum lia vizito en la monato Majo 1913, kaj aperintaj en la lasta numero de „Pax”. Dom Aelred loĝadis sur Monte Cassino dum la kunveno de la Benediktaj Abatoj por la elekto de Koadjutoro al la Abato-Primato.

El Monte Cassino, Dom Aelred skribas:

”Estis vere mirinde vidi nin ĉiujn forlasantajn S. Anselmon

¹⁾ Ni denove atentigas pri la ĝusta signifo de la vorto „Abato“, signifo, kiun bone indikas la noto de nia religia Direktoro en E. K. No. 102 (Jan. 1914, p. 16). — *La redakcio,*

por iri al Monte Cassino. Je la naŭa, Abatoj kaj monaĥoj kun sakoĵ kuradis ĉiudirekten en la monaĥejo; surbrustaj krucoj, abataj ringoj briladis sub la sunradioj... ĉie regis bonhumoro kaj plezura atendado de la semajno pasigota en la hejmo de S. Benedikto, en la lulilo de la Ordeno.

Sur la aleo atendis longa vico de veturiletoj: tuj kiam unu estis plena de abatoj kaj pakaĵoj, alia anstataŭis ĝin, kaj ni ekiris al la stacidomo. Speciala vagono estis rezervita por la Patroj-Abatoj; kaj ĝi estis tute plena, mi kredas, kiam ni forveturis je la deka. Mi vojaĝis kun la Abatoj de Downside, Maredsous, St. André, kaj la Ĉefabato de Beuron. Antaŭ la foriro, oni prezentis min al la Abato-Prezidanto de la Brazilia Kongregacio, Mgr. van Caloen (kiu estas ankaŭ episkopo), kaj al la Abatoj de Erdington, Marseille, Farnborough, Solesmes, Maria-Laach, kaj Fort-Aŭgustus. La Abato de Einsiedeln kaj la Ĉefabato de Bucharest estis kune. Mi estis tre feliĉa revidi la unuan: li estas vere afablega Abato. Ni diris nian oficon, ni multe interparolis; sume, ni pasigis plej plaĉan matenon, kaj alvenis al la stacidomo de Monte Cassino je tagmezo. Baldaŭ la aŭtomobiloj estis plenaj de Abatoj kaj pakaĵoj; ĉeestis, plie, certa nombro de veturiloj ornamitaj per rubandoj kaj sonoriletoj. Ni elektis unu, kun du fortaj ĉevaloj, kaj la Abatoj de Maredsous kaj Maria-Laach kaj mi forveturis kune. Tuta horo estas postulata por atingi la supron de la monto, sur kiu staras la fama Benedikta Abatejo. La vojo ĉiam zigzagas, — tute nova vojo; antaŭ nur malmultaj jaroj oni uzis azenojn por la suprenirado. La monto mem estas kruta, sovaĝa, kun grandegaj grizaj rokoj ĉie dissemitaj. Olivarboj kaj vinberujoj kreskas sur ĉiu eta terspaco, kaj la vidaĵo, ĉe la suprenirado, estas admirinda.

Ni atingis la Abatejon ĉirkaŭe je la 2.30, tre malsataj. Ĉe la pordo atendis nin kelkaj membroj de la Komunumo. Longaj ŝtonaj ŝtuparoj kondukis nin al la peristilo. Unue, ni vizitis la preĝejon. Ĝi estas katedra preĝejo, ĉar la Abato estas la Ordinario de la Eparĥio, kvankam ne episkopo. Nia sankta patro kaj S. Scholastica estas enterigitaj sub la Ĉefaltaro.

Poste ni iris al niaj ĉambroj. Mi baldaŭ trovis la mian apud tiu de Abato Columba: „D. Aelredus Carlyle of Caldey”. Ĉarma ĝi estas, tiu ĉelo, kun elektra lumo, kaj grandega lavilo. Ĉio estas purega kaj brila. El la fenestro mi ĝuas plej ravan vidaĵon sur la tuta ebena. Malproksime staras la vastaj Sabinaj montoj; ĉe la piedo de la monto kuŝas la fruktoporta valo, kun, tute malsupre, la stacidomo kaj la vendejplaco. Mi rapide pretiĝas kaj iras al la refektorio. Post la manĝo, la Abato de Monte Cassino eniris por bonvensaluti min; poste, unu post alia, ĉiuj malaperis en sian ĉelon por tagmeza ripozeto. Je la kvina mi iris en la kripton. Pasante tra la peristilo, mi vidis junulon, kies okuloj senĉese sekvis min. Mi demandis lin, ĉu li deziras ion, kaj li respondis angle: „Mi miras pro via stranga simileco kun la Abato de Caldey”. Mi respondis, ke tio ne estas tiel stranga, ĉar mi havas kun li plej intiman rilaton! Li ĝojis, kaj diris al mi, ke li aŭdis predikon de mi en Manchester.

Poste, teo. Vere angla teo, en komforta eta refektorio. Tre vivplena kunveno ĝi estis, kun ĉiu en plej gaja humoro. La mirinda bonkoreco kaj vere frata sento regantaj inter ĉiuj tiuj episkopoj kaj Abatoj rivelis al mi la vivon de la katolika Eklezio. Diverslandanoj, diverslingvanoj renkontiĝas, kiel unu familio, en la domo de sia patro, S. Benedikto. Mi altege ŝatis tion. Mi sentas, ke estas granda privilegio esti ĉi tie.

Kuriozaĵo de la Dia Graco.

La Abato diris al mi kelkajn gratulajn vortojn. Mi rimarkis: „Jes, mi estas kuriozaĵo en tiu momento”. Kaj li tuj respondis: „Vere, vi estas kuriozaĵo de la Dia graco; ni konsideras ĝin, kaj dankas Dion, kaj plifortiĝas”. Ĉu ne belete esprimita?

Ni ĵus havis teruran uraganon, kun fulmotondroj kaj densa pluvego. Mi staris ĉe la fenestro kaj pensadis al S. Benedikto, kiu tiel ofte sendube vidis la saman scenon. Tiam unu el la monaĥoj, Maltaĥo, venis por iom paroleti kun mi. Post momento, la Patro Abato kunprenis min por

mallonga promenado en la peristiloj. La vespermanĝo okazis je la 7.45. Mirinde estis vidi la kuniĝon de sesdek Abatoj, kvar Episkopoj, kaj unu Ĉefepiskopo. Morgaŭ estos atendata la Kardinalo Gaspari

La celo de tiu granda kunveno de Abatoj en S. Anselmo estas atingita. Plenumita estas la ordono de la Sankta Patro elekti Koadjutoron por la Abato-Primate . . . Unuanima estis la voĉdono. Ĉiuj ĝojas, pro la elekto de la Abato de Maria-Laach. Li estas ĉirkaŭe 47 jara; . . . parolas tute flue la italan, anglan kaj francan lingvojn, kaj li havas multajn aliajn talentojn, kiuj igas lin absolute konvena por lia nova, grava tasko.

En la Vatikano.

Mi ĵus travivis la ĉefan okazintaĵon de mia vivo. Por la unua fojo mi vidis tiun, al kiu de tiel longe sin turnis miaj pensoj kaj mia alligiteco. Mi parolis kun la Patro de la Kristanaro; mi surgenuis ĉe liaj piedoj; mi ricevis lian specialan benon.

Hodiaŭ matene, vekigante, mi ĉiam rediris al mi: „Hodiaŭ mi vidos la Papon!” Mi sentis nenian eksciton, — sed feliĉan, kvietan certecon, ke mia konvertiĝo, miaj fratoj kaj mi, estos benataj kaj fortigitaj per la momentoj, kiujn mi pasigos en la ĉeesto de la Vikario de nia Sinjoro Jesu-Kristo kaj Ĉefo de Lia Eklezio sur la tero

Duonhoron ni atendis en unu el la akceptoĉambroj. La muroj estis kovritaj per ruĝa silko. En unu flanko de la ĉambro staris trono sub baldakeno.

Dum Abato Columba parolis kun Kanada episkopo, mi elrigardetis el inter la blankaj silkaj kurtenoj, tiritaj antaŭ ĉiuj fenestroj. Mi rigardis, tute malsupren, al la Placo de S. Petro. Jen la popolo, la veturiloj, la vigla vivo de la urbo, kaj la grandaj konstruaĵoj de la antikva, mezepoka, kaj moderna Romo. Tiam mi sentis iom de tiu impreso de foriĝo kaj izoleco, kiu por la Sankta Patro mem iafoje sendube estas preskaŭ netolerebla.

Mi pensis pri la longaj jaroj, kiujn pasigis Leo XIII-a enŝlosita en ĉi tiuj ĉambroj: kiel ofte li kaj lia posteulo

sendube elrigardis, el tiuj fenestroj, sur tiun grandan fluon de homa vivo, moviĝantan ĉi malsupre. Kiel avide la Papo kredeble konsideras tiujn homojn, kiujn li neniam renkontos, se ili ne elvenas el sia ĉirkaŭaĵo en la kvietajn solenajn ĉambrojn, kiuj por ili estas sanktejo, kaj por la Papo mem malliberejo.

Kiel ofte aŭdiĝis tie ĉi la energiaj, fervoraj deklaroj de Leo XIII! Kiel ofte tiu riĉa vibranta voĉo trapenetris la aŭskultantojn!

El tiu trono, malgraŭ sia malhelpata agado kaj limigata potenco, la Sankta Patro havas nuntempe pli profundan kaj universalan influon ol ia ajn reganto en la mondo. Li regas super la koroj. Li estras sur milionoj da animoj, kiuj honoras lin kiel sian Patron.

Kaj al tiu Patro mi, etulo, venis por genufleksi ĉe liaj piedoj, por aŭskulti liajn vortojn, kaj por ricevi de li helpon, benon, kaj la riĉaĵojn de regno supertera.

La Sankta Patro.

Post momento, pordo malfermiĝas, kaj ree fermiĝas. Eliris episkopo. Prelato rapidas diri al ni, ke estas nia vico.

Ni eniris, kaj trovis nin en vasta ĉambro meblita kiel librejo kaj studejo. Neniu, ŝajne, estis en ĝi.

Irante pli antaŭen en la ĉambro, tamen, ni ekvidis, preskaŭ malantaŭ la ĵus trairita pordo, angulon garnitan per libroj kaj amaso da paperoj: malfermita sur pupitro kuŝis la eta libro de fotografaĵoj el Caldey, kiun mi petis Kardinalon Merry del Val doni al la Papo. Ĉe la pupitro staris, ĝuste leviĝante por saluti nin, la Sankto Patro, Pio Deko. Tiel malgranda estis la distanco inter la pordo kaj la loko, kie li staris, ke ni havis tempon genufleksi nur unufoje, antaŭ kiam ni troviĝis ĉe liaj piedoj. Li ne permesis al ni resti surgenue. Kisinte lian manon, ni eksidis . . . Abato Columba sidis antaŭ la Papo, kaj mi, sur seĝo tute apud li, maldekstre. Li estis blanke vestita, sen ia kruco aŭ ringo aŭ zono. Li aspektis sufiĉe bonfarta; ne vidiĝis multaj postesignoj de ĵusaj suferoj aŭ de liaj 79 jaroj.

La Papo parolas kviete kaj malrapide, rigardante tre

atente la alparolaton, kaj per kelkaj facilaj gestoj akcentante la vortojn. Li komencis paroli al ni, latine, pri la granda favoro, kaj graco, ricevita de la Abato kaj Monaĥoj de Caldey en ilia (laŭ lia diro) mirakla konvertiĝo . . .

Tiam venis la momento retiriĝi. Dum Abato Columba forlasis la ĉambron, la Sankta Patro benis min, premante ambaŭ manojn sur mian kapon, kaj mi eliris kun sento de granda paco kaj feliĉo. Mi ne spertis fortan emocion, sed nur konsciis, ke mi staris en la ĉeesto de sankta, respektinda Patro, kies kora amo surbordiĝas al Siaj infanoj. Ne estis necese, ke mi parolu multe aŭ petu pri io. La Papo ja diris, ke ĉio estos farata por helpi nin daŭrigi nian laboradon. Li ja benis min kaj mian komunumon, kaj promesis preĝi por mi. Ĉion tion li faris kun plej granda afableco, bonkoreco kaj spontaneeco.

La aŭdienco daŭris dudek minutojn . . . Poste ni iris preĝi ĉe la tombo, kie kuŝas la Apostolo, kies posteulon ni ĵus vidis en la Vatikano.

*Eltirita el „The Tablet” (27-an Sept. 1913)
angla Katolika gazeto.*

M. RAMO.

La Fino de la Mondo.

La Pastro Moreux, direktoro de la Observatorio de Bourges (Francujo), kies oni konas la grandan indecon kiel scienculo kaj la grandan talenton kiel scienca vulgariganto, ĵus publikigis la lastan parton de monda „triloĝio”, kiu sin dividas tiel: El kie ni venas? Kie ni estas? Kien ni iras?

Ni, t. e. la homaro kaj la tero, kiu nin portas. Post ke li montris nian devenon, la Pastro Moreux parolas pri la fino de la mondo.

*
*
*

Ĉu la mondo pereos per la malvarmo aŭ la fajro? Scienco konsentas pri la ebleco de unu aŭ alia el tiuj tim-

indaj eventualaĵoj. Evangelio ŝajnas montri la duan kiel fermonta la epokon de la jarcentoj sur tero. Ne estas kontraŭdiroj, en tiu temo same ne kiel en ĉiuj aliaj, je racio kaj kredo, je la scienco akirita de la homo kaj la revelo farita de Dio.

En hipotezo de fino de la mondo per fajro, ebleco de interfrapiĝo de la tero kaj de ia kometo esplorita estis.

Pri tio, la Pastro Moreux prezentas al ni la lastajn sciigojn de la plej novaj ekstrovoj, kaj niaj legantoj legos certe kun profito tiun ĉapitron, kiun ni prenas el lia libro.

*
*
*

La interfrapiĝo de la tero kaj de la atomaj substancoj, kiuj konsistigas treniĝon de la kometoj, ne evidentigas starigontan danĝeron por la mondo, kie ni loĝas.

Unue tiuj atomoj estas tiel maldikegaj, ke verŝajne la tero ilin trapasus eĉ sen ke ni tion rimarkus.

Poste, ni ne bezonus eĉ scii kion treniĝo de kometo povus kaŭzi sur vivantuloj, ĉar neniam tiu treniĝo povos atingi teron. La treniĝo de la kometoj enhavas efektive staton de neimagebla maldensegiĝo; nia atmosfero, kompare, starigus plumban aŭ platenan medion, tiamaniere ke kolizio estas tute neebla kaj ke la tera atmosfero repuŝus simple malĝusttempan vizitanton. Cetere, kelkafoje la tero trapasis treniĝojn de kometoj sen ke la plej malgranda malbonaĵo rezultis el tio. Kiam ni diras trapasi, ni volas diri, ke ĝi renkontis kaj repuŝis.

*
*
*

Postrestas, — kaj nun ni laŭvorte citas Pastron MOREUX, — postrestas imagi, kion okazus en la kazo, se tero interfrapiĝus ĝin, ne la nepalpeblan treniĝon de ia kometo, sed ĝian kernon mem.

Kaj rimarku, ke la kazo estas tute realigebla.

Ne antaŭ tre longe, la famega Laplace firme asertis, ke la kometoj ĉiufanken trairas la astrajn interspacojn, kaj la poetoj de tiu tempo ne preterlasis uzi la okazon por pri-kanti tiujn rapidajn anoncantojn (la kometoj) kunligantajn, inter ili, la mondojn de senlimo.

Al tiu demando: „El kie venas kometoj?” la moderna

Astronomio respondas konigante al ni, ke la kometoj akompanas la sunan Sistemon en ĝia granda vojaĝo tra la konstelacioj. Nia Suno, ĝi diras, estas nur stelo vojerarigita meze de senlima spaco; inter tiuj milionoj da astroj brilantaj super niaj kapoj, la centro de nia Sistema estas nur stelo meze de steloj.

Same kiel ili, ĝi estas movita per fantaziega rapideco, kiun oni povas taksi ĉirkaŭ dudek kilometroj dum unu sekundo. Eta soldato de ĉiela armeo, ĝi kuntrenas planedojn, teron, ĝiajn satelitojn, kaj tiujn astrojn pli etajn, kiujn ni nomas kometoj.

Sed tiuj vagemaj anoncantoj sekvas ĝin kiel tiom da papilioj altiritaj al ĝia intensa radiado. Restaĵoj de la granda nebulozo, kiu naskis planedojn, la kometoj, laŭ la leĝoj de altireco, — influante malsame sur ĉiu, — disiris sur longaj elipsoj. Kelkaj el ili turnas sur rondvojoj entenitaj en la limoj de la planedoj. Aliaj, kontraŭe, ĵetitaj estis al malproksimajn regionojn, tiel malproksimaj ke, ĉe tiuj grandegaj distancoj, la suna altireco apenaŭ sin sentigas kaj oni povis kalkuli, ke tiuj kometoj ne trairas pli ol kelkajn centimetrojn nur dum unu sekundo.

Tute egale! la neflekseblaj leĝoj, kiuj regas la materion, ilin alkondukos, pli malpli baldaŭ al la grandan fonton varman kaj luman, kiu ilin entenas ligitaj al ĝia vastega kampo.

Tiuj novaj teorioj povas solaj klarigi al ni la grandegan nombron da kometoj trakurantaj la planedan interspacon.

El la statistikoj saĝe interpretitaj, estas necese konkludi efektive, ke spaco entenata inter la Suno kaj Neptuno, la lasta planedo konata de la suna Sistema, ne enhavus malpli da 200 milionojn da kometoj periodaj.

Sekve de tiuj ciferoj, facile estas kalkuli la nombron de tiuj astroj, kiuj postiras en ĝia irado nian Sunon, kaj kiuj ne eliras el ĝia sfero de altireco; oni atingas tiam la ciferon 75, sekvita de 15 nuloj: 75 kvaroblionojn da kometoj, aŭ 75 milionojn de miliardoj da multharaj astroj! Ankoraŭ tio estas nur pogranda takso bazita sur minimumaj ciferoj!

Jen do una fariĝo firmigita: la multego da kometoj vojaĝantaj en spacon.

De tiam, oni konceptas facile, ke, je ĉia momento de ĝia irado ĉirkaŭ la Suno, en tiu kapturniga kurado, kiu faras trairi 29 kilometrojn dum unu sekundo, la Tero povus interfrapiĝi kometon aŭ pliguste kometan kernon.

Ni supozu, ke simila fariĝo baldaŭ okazonta estus. Kelkaj tagoj antaŭe la fenomeno estus anoncota de astronomiistoj; ni havus tiam unu solan rimedon: forkuri al antipodojn, nin rapidegigi per la tuta rapideco de niaj aŭtomobiloj, de niaj vaporŝipoj aŭ de niaj aeroplanoj al la duonsferon kontraŭan je la interfrapiĝo.

Ĉar, efektive la kometa kerno sola sufiĉus por detrui plurajn urbojn kiel Parizo, kion diri pri la terura kolizio okazonta per la interfrapiĝo de amaso atinganta la amplekson de nia terglobo?

Kelkaj horoj antaŭ la kataklismo, la homaro timeganta ĉeestos al timigaj vidoj: riveregoj kaj maroj komencos eliri el siaj limoj. Kun iliaj furiozaj ondegoj, la oceanoj atake sin ĵetegos sur la kontinento

Antaŭ tia malfeliĉego, la solaj popoloj rifuĝitaj ĉe la supro de la plej altaj montoj havos la teruran vidon de la antaŭaj scenoj de la fino de la mondo.

Sur maro sen bordoj glitflugos palega krepusko. La suna disko, duonvidita tra la atmosfero de la kerno, prezentos malbonsignan koloron. La unuaj partikuloj kometaj, flamiĝante ĉe kontakto de nia atmosfero, prezentos vidon de la plej mirinda piroteknikaĵo, kiun homo neniam admire rigardis.

Plie tiuj fenomenoj nur estos la antaŭsignoj de timega brulego

La momento, kiam la plej dika parto de la kometo kontaktiĝos kun la alta atmosfero, estos la signalo de la ĝenerala skuo. Ok sekundoj apenaŭ forpasos de la komenco de tiu fortega fulmotondro ĝis la momento kiam, per terura kolizio, la kontinentoj malfermiĝos. La falo de ĉiuj tiuj aĵoj fajraj meze de la furiozita ventego sur la oceano kaŭzos en unu minuto trombojn de varmegaj vaporoj, kiuj

detruos la lastajn organismojn nedifektitajn dum la katastrofo.

Ĉu la homaro, elmigrinta ĉe alia flanko de la terglobo povos sin ŝirmi kontraŭ la kataklismo? Neniu povas tion certigi.

Kaj kia astronomo povas certigi, ke simila kolizio ne okazos post kelkaj jaroj eble?

Tiam homaro pensos pri tiuj timegaj paroloj, kiujn raportas la Apostolo:

„En tiu-ĉi epoko, Jezuo diris al siaj disĉiploj: Kiam vi vidos abomenegon antaŭanoncitan de la profeto Daniel sin disvastigi en la sankta loko (ke tiu, kiu legas, komprenu), tiam ke tiuj, kiuj estos en Judeo, forkuru en la montojn, ke tiuj, kiuj estos sur la tegmento, ne malsupreniru por forporti kelkan objekton el sia domo, kaj ke tiu, kiu estos en la kampoj, ne reiru por preni sian veston. Preĝu, por ke via forkuro ne okazos vintre aŭ sabate, ĉar la kontraŭaĵo estos tiam tiel granda, ke neniam de la komenco de la mondo ĝis nun, ne estis simila kaj ke neniam estos...

„Ĉar la reĝiĝo de la Filo de la homo estos kiel la fulmo, kiu foriras el oriento kaj brilas ĝis okcidento. Ĉie kie korpo estos, tien kunvenos agloj. Sed tuj post tiuj tagoj de kontraŭaĵo, la suno mallumiĝos, la luno ne donos plu sian lumon, la steloj falos el la ĉielo kaj la potencoj de la ĉielo ŝancelos...

„Vere mi tion diras al vi, tiu generacio ne forpasos, ke ĉio-ĉi okazis. La ĉielo kaj la terglobo forpasos, sed miaj vortoj ne forpasos.”

Pastro MOREUX;
trad. Max ROUB.

PREDIKO

dirita de P-ro BIANCHINI

en la preĝejo de la Patroj Kamilianoj en Romo
dum „Nia Kvara”.

Homo natus de muliere — brevi vivens tempore — repletur multis miseriis (Job. 14). Homo naskiĝinta de virino, dum mallonga tempo li vivas, pleniĝante je multaj mizeroj.

Karaj gefratoj, ĉiuj vortoj de la S. Biblio plenumiĝas, sed ĉi tiuj vortoj de Jobo. plenumiĝas antaŭ niaj okuloj ĉiutage, ĉiuhore, ĉiumomente. Kio estas nia vivo? *Estas kiel unutaga floro, kiel neniĝanta ombro*, diras Jobo, *kiel herbo kaj fajno*, diras Isaio, *kiel malaperanta lumigata nuboj*, diras S. Jakobo. Kaj hodiaŭ pli ol iam ni sentas tiun veron. Niaj dolorantaj koroj, niaj melankolie palaj vizaĝoj diras, ke ni estas georfoj, sen nia amata patro RICHARDSON. Kiel Moseo vidante la promesitan teron li mortis, kaj kiel Elizeo antaŭ foriro de Elio ni devas ekkrii: *Pater mi, Pater mi, currus Israel et auriga ejus (4. R. 2. 12.)* Nia ekzemplo, nia gvidanto, vi batalodis antaŭ ni per via doktrino, per via preĝo, kaj antaŭ niaj plej belaj tagoj oni vin forprenis al ni.

Via animo estas en la manoj de Dio, vin ne plu ofendas la teraj mizeroj; nin gardu el la ĉielo, preĝu por ni, por ke ni ankaŭ kuniĝu kun vi antaŭ la trono de Dio post plenumo de ĉiuj niaj devoj. Kaj dume, karaj gefatroj, ni preĝu plej fervore por nia amata patro, por ke Dio donu al li la eternan ripozon, kaj el la ĉagreno, kiun Dio permesis al ni, ni lernu, kio estas nia vivo, kia ĝi devas esti por plenumi ĉiujn niajn devojn surtere kaj atingi en ĉielo senfinan feliĉon.

1. *Homo natus de muliere.* Naskiĝintaj de virino, je korpo ni estas malfortaj kaj inklinaj al multaj mizeroj. Ho ve! Kiom da mizeroj surtere! Naskiĝinte nia unua voĉo estas voĉo de ploro, nia lasta elspiro estas malvarma ŝvito! Meze de tiuj du senkonsciaj aktoj ni troviĝas ĉiam en

valo de larmoj, de mizeroj, kiuj eluzas nian vivon kiel rusto la feron, kiel flamo la kandelon. Tamen ni kristanoj meze de ĉagrenoj trovas grandajn feliĉojn, ĉar *la favoro de Dio estas super ni* (Ps. 89), *en mizero Li estas kun ni* (Ps. 90). *Liaj konsoloj karesas nian animon* (Ps. 93). *Mi suferas, sed mi ne konfuziĝas*, diris Sankta Paŭlo, *ĉar Dio mem konservas miajn suferojn por la lasta tago.* (2 Tim. I, 12). Dio mem sekigos la larmojn al siaj fideloj kaj ilin kondukos, kie ne estas plu mortoj nek dolorkrioj, sed oni ĝuos feliĉon, kiun homa okulo ne vidis, orelo ne audis, koro ne sentis.

2. *Brevi vivens tempore: dum mallonga tempo li vivas.* Kiel floro li aperas kaj sekiĝas, forpasas kiel ombro kaj neniam en sama stato li restas (14). *Miaj tagoj estis pli rapidaj ol rapida rajdanto, foriris kaj ne vidis bonon, forflugis kiel aglo* (Job. 9). *Pasis kiel fumo miaj tagoj. faliĝis kiel herbo kaj sekiĝis mia koro* (Ps. 101) *miaj tagoj malaperis kiel ombro* (Ps. 101) *la daŭro de mia vivo estas kiel nenio* (Ps. 38). *Sed la boneco de Dio daŭras eterne* (Ps. 102). Sekve S. Petro volas ke ni ĉiam memoru, ke ni estas surtere pilgrimantoj kaj fremduloj kaj ke ni devas nin gardi kontraŭ karnaj deziroj, kiuj ĉiam almitas kontraŭ nia animo.

3. Dio volis nin tiel malfortaj, tiel malperfektaj je korpo, por ke nia plej granda zorgo estu pri animo. Ho karaj gefratoj, nia animo estas *senmorta bildo de Dio, sanktejo de Dio, heredo de Dio. Deus creavit hominem ad imaginem suam.* Dio kreis homon laŭ Sia bildo. Bildo havas grandan valoron laŭ aŭtoro kiu ĝin faris, laŭ persono kiun ĝi reprezentas. Sed nia animo estas kreita de Dio mem, kaj Dion mem reprezentas, sekve ĝi havas senfinan valoron. Ve' al tiu kiu malbonigas kaj malpurigas tiun ĉi multvaloran bildon, kreita de Dio kaj sanktigita de Nia Sinjoro Jesu-Kristo!

Ni estas sanktejo de Dio. En nia bapto, en nia konfirmacio ni ricevis la Spiriton Sanktan, kiu nun helpas nian malfortecon (R. 8. 26); nin defendas kontraŭ malamikoj (Mt. 10, 20); atestas por ni (R. 8, 16); propetas por ni

(R. 8, 26); donas al ni eternan ripozon (Apok. 14, 13); loĝas en ni (1, K. 3, 16); ni estas Lia templo, Lia sanktejo (1, K. 6, 19); ni ne devas Lin ĉagreni per pekoj — *glorificate et portate Deum in corpore vestro* — gloru kaj portu Dion en via korpo (1, K. 6).

Ni estas *heredaĵo de Dio*. *Se mi malĉastiĝos*, diris Jobo, *kian parton havos en mi Dio sur ĉieloj, kiun heredaĵon la ĉiopovanto (31)?* Jezuo diris nin sia rikoltota tritiko; frukto de sia vinberejo; fiŝoj de sia fiŝkaptejo; ŝafidoj de sia ŝafaro. Ho feliĉoj tiuj, kiuj vivadas ĉiam indaj je Dio, indaj je ĉiela eterna feliĉo, ili laŭdos Dion por la tuta eterneco — *in saecula saeculorum laudabunt. Amen.*

Raporto pri Antialkohola Movado dum „Nia Kvara”.

I. Raporteto de F-ino Hornung el Augsburg.

*Grandaj Sukcesoj en la Antialkohola Movado inter la
Katolikoj en Germanujo.*

Interkonfesaj kaj protestantaj ligoj de longe fervorege laboris en la batalo kontraŭ alkoholismo, sed la katolikoj restis tro longe indiferentaj. Ili opiniis, ke oni sukcesus predikante nur la sobriecon. Sed nun, ankaŭ la katolikoj komprenas, ke daŭrigajn sukcesojn oni nur atengos per bone organizitaj abstinencoligoj. Ĉar la laboro devas esti profilaksia kaj persista.

Por tio la laboro komencas ĉe la infanoj kaj finas ĉe la drinkuloj.

En Berlino okazis, je la Pasko 1913, la unua kongreso por la senalkohola edukado de la infanaro. Tri katolikaj pastroj fervore partoprenis.

Ni bezonas multajn abstinenculojn por doni bonan ekzemplon, ĉar por la savo de drinkuloj ne ekzistas alia

rimedo ol la plena sindeteno, *la abstinenco*. Oni pruvu al la viktimoj de l' alkoholo, ke ĝi tute ne estas necesa nutraĵo, sed simple nebezona *ĝua* ilo, eĉ *ĝua veneno*.

Bedaŭrinde, inter la 40.000 drinkuloj, kiuj, ĉiujare, en Germanujo, staras antaŭ la krimjuĝisto, la plimulto estas katolikoj. Ekzistos do por ni grava motivo, eĉ sankta devo labori en la unuaj vicoj de la alkoholkontraŭuloj.

Nia Sankta Patro, la papa Moŝto, diris, ke abstinenco estas unu el la rimedoj por renovigi la religian vivon. Pro tio la germanaj episkopoj celas fondi en ĉiu eparĥio grupojn de la krucligo.

Dum la jaro 1912-a 20.000 plenkreskuloj, kaj 40.000 infanoj aliĝis. Tiu progreso daŭras ĝis nun, en la sama mirinda maniero. La krucligo havas nun proksimume 50.000 plenkreskulojn kaj 100.000 infanojn.

Tiu bela progreso estas ŝuldata al la franciskana monaĥo, patro Elpidius, la „germana abstinenca apostolo”.

12 episkopoj alvokis tiun elokventan oratoran por prediki en preĝejoj, kaj paroli en publikaj kunvenoj. Li prezentis abstinencan kiel *gravan societan devon* de la katolikaro, — plenuminda pro amo al Dio kaj al la proksimulo.

Ni nur citos la okazintaĵojn en mia urbo, Augsburg en Bavarujo.

Patro Elpidius parolis dum 4 tagoj, kvinfoje en la preĝejoj, kvinfoje aliloke, 500 personoj donis inter liaj manoj la *promeson* sin deteni dum unu jaro de ĉiu alkoholaĵo.

Bela sukceso, kaj necesega, ĉar la mizero naskita de alkoholismo krias je la ĉielo.

Estas necesega, ke la pastraro laboru fervore en la anti-alkohola movado.

La mortinta Kardinalo Nagl, el **Wien**, diris, en sia lasta pastra letero, ke la abstinenca movado *certe* kreskos kaj prosperos, sed se ĝi disvastiĝos *sen* la katolikaro, ĝi kreskos *kontraŭ* ni.

II. Svisa Raporto.

Jam en 1906, la Reverinda Kanoniko Gross, kun kelkaj

Svisaj amikoj, interrilatiĝis kun alilandaj abstinenculoj por fondi internacian katolikan abstinencofederacion.

La unuaj rezultatoj de tiu klopodo ne estis tre kontentigaj: la projekto de niaj svisaj amikoj, verdire, renkontis aprobon teorian, sed nenia progreso reale enpraktikiĝis.

Tiun-ĉi jaron, tamen, okaze de la baldaŭa abstinenca kongreso en Milano, Kanoniko Gross preparis, por la fondota Federacio, provizorajn statutojn. Kaj ĝoje li konstatis, ke lia projekto estas favore konsiderata en la abstinencula mondo. La *germana* Ligo de la kruco (Kreuzbündniss), kiu havas 140.000 membrojn, aprobe respondis. Ĵus aliĝis la „*Pioniroj de la Sankta Koro*”, en *Irlando*, societo fondita de la Jezuitoj. Ĝi sendos reprezentanton al la Milana Kongreso. Tiu societo, kiu akceptas nur ĉiamajn, dumvivajn abstinenculojn, enhavas 270.000 membrojn.

La juna societo „*Ora Kruco*”, en *Francujo*, ankaŭ aliĝos al la Federacio.

Polujo kaj *Aŭstrio* kredeble sekvos tiun ekzemplon.

Nederlando, la unua aliĝanto, kompreneble okupos la unuan vicon en la Federacio kun nia svisa Ligo.

Oni rajte esperas akiri ankaŭ la konsenton de la tre multmembra societo de Patro Matthew en *Irlando*.

Ankaŭ kun *Kanado* kaj *Usono* ni interrilatis. Lia Moŝto Kardinalo Mercier el *Belgujo*, — tre favora al tiu movado, alkondukos al ni la *junajn belgajn* societojn.

Prave ni do antaŭ-kalkulas, ke la federacio kunigôs, dum la unua jaro, almenaŭ *600.000* anojn.

Nun ni bezonas vian helpon, estimataj samideanoj; mankas al ni *adresoj*, por interrilati kun anglaj kolonioj. Ŝajnas, ke ekzistas en *Aŭstralio* multaj katolikaj abstinenco-societoj. Certe estas kelkaj en *Hindujo*.

Sed speciale ni dezirus fari la eblon por akiri la aprobon de la *angla Ligo de la Kruco* (League of the Cross). Ĝis nun, pro ia malkompreniĝo, ni ne jam povis atingi ĉi-tiun nian koran deziron.

Ĉu ia angla samideano ne povus helpi nin pri tio, donante adresojn, aŭ uzante sian influon favore al nia movado?

Fine — kaj por ni tio estas speciale interesa — Kanoniko Gross aldonas al sia raporteto jenajn vortojn:

„Oni prave povus proponi al la Internacia Abstinenco-Oficejo, starigita en Milano, la uzadon de Esperanto, — sed ne ekskluzive, t. e. kune kun la franca, angla, germana, itala, kaj latina lingvoj. Estas al ni tre agrable, se ia membro de via komitato povus ĉeesti nian kunvenon, kaj donus al ni kelkajn presaĵojn por konigi al ni Esperanton, tiamaniere, ke ni almenaŭ povu kompreni la leterojn adresitajn al la Oficejo.” —

Laŭ ĵus ricevita poŝtkarto, la Reverinda Kanoniko anoncas al mi, ke oni alprenos Esperanton, kiel interkorespondilon kun la „Internacia Abstinenca Oficejo”! Li mem ĵus lernis nian lingvon.

Kanoniko Gross dezirus koni adresojn de Katol. Societoj en Skotlando, kaj en Kimrujo. Se tiuj societoj ne sendos delegitojn, Kanon. Gross povus ilin reprezenti ĉe la kongreso, kiel li reprezentas la irlandajn Pionirojn. Ankaŭ individue, katolikoj povas aliĝi la Ligon.

Kanoniko Gross ĵus skrikis: Mi denove *insiste* petegas, ke oni klopodu, por ke la Angla Ligo de la Kruco ne restu aparte, kiam aliĝos ĉiuj aliaj nacioj. Ni kore esperas kaj atendas ankaŭ la Anglan aliĝon. Ĉu ia el la ĉeestantaj samideanoj povus helpi por atingi tiun rezultaton?

Ekskursoj kaj Pilgrima Vizito al la

Sanktaj Lokoj de l' Eterna Urbo dum „Nia Kvara”.

*Daŭrigo. *)*

Tagordo de la 5-an de Septembro:

a) *Antaŭtagmeze:*

Je la 7-a: Diservo por la mortintaj I. K. U. E.-anoj; Vizito al la kapucenejo; — Trinita dei monti, Instituto Flaminia,

*) Vidi E. K. Nov. kaj Dec. 1913 (no. 100 kaj no. 101).

Piazza di Spagna; laborkunsido en „Via Aliberti” (katolikaj misionoj (Bianchini) kaj la anglikanismo kaj la katolika eklezio (S-ro Milsom).

b) *Posttagmeze:*

S. Laŭrenzo fuori le mure. (S. Laŭrenco ekster la muroj); — S. Croce in Jerusaleme. (Kruco en Jerusalemo); — „Scala Sancta” (sankta stuparo); — Laterana; — Piazza di Spagna; — Pincio (elparolu Pinço).

Pri la Diservo kaj la laborkunsidoj raporti ankaŭ hodiaŭ ne estas mia devo. Mi nur raportos pri la ekskursita parto kaj en ĉi-tiu rilato unue pri la loĝejo de diosakrataj monaĥaj homoj, kiuj en sia simpleco kaj malavareco por la mondo de l' 20-a jarcento estas unu el la plej efikaj modeloj de l' unua kaj ĉiama penso kristana pri libera malriĉeco kaj sindetenemo. Ni nomas la *kapucenejon*, norde de la Piazza Barberini. En la interno de la preĝejo pleje meritas memoron bela kopio de l' „Navicella (= boateto) dei Giotto”, kiu sin trovas en la enirejo de la Preĝejo de S. Petro, kaj l' „arĥanĝelo Michael” kiel moderna sankta Appollo enĉenas Luciferon. La tombo de l' kardinalo Barberini portas la enskribon: „Ĉi tie kuŝas polvo, cindro kaj neniaĵo”.

De la Ĥoro malsuprenirigas stuparo al kvar „mortintkapeloj”, kie la ostegoj de monaĥaj skeletoj estas uzataj kiel ornamentaĵo de l' vandoj. Ostaroj en kapucenaj vestoj salutas la vizitanton. Estas la spirito kaj la vivo de la mortintoj, kiuj nin renkontis. Por tiu ĉi sankta tombejo, la tero estas alportita el Jerusalemo. Sed jen malĝaja okazintaĵo. Franca „Teosofino” okaze ĉeestinta sentis la permeson, deklari, ke ŝi iam bezonos la bruladon de ŝia korpo mortonta. Por mi kontraŭe estas bezono kaj devo rediri ĉi tie laŭte al la tuta mondo mian donitan respondon. Por ni katolikoj estas sankta la entombigo de la korpoj homaj mortintaj en la teron, kiel ankaŭ laŭ la raporto de l' evangelioj, nia Savinto estis enterigita post la depreno de la kruco. Cetere inter katolikoj tutege ne estas diskutado pri ĉi tiu demando. Ĉar „Roma locuta, causa finita.” Ni scias, ke nia eklezio deklaris ekskomunikota ĉiun katolikon, kiu laŭvole estos en la senco de la framaso brulado-ma-

niero bruliĝanta, anstataŭ enterigota. Nia eklezio ordonas klare kaj precize la enterigon de la korpa parto de l' mortanta homaro.

Bedaŭrinde, ke la 2an de Novembro ni ne plu povis ĉeesti la grandan feston de la je tiu dato speciale lumigita krurarejo de l' Romanaj kapucenoj. Sed ĝis revido alifoje, mortintuloj!

„Hodiaŭ Vi kaj morgau ni.”

Kiu en la sekvonta numero de Espero katolika scribos specialan malgrandan artikoleon pri la kapucenoj kaj la kaŭzoj de ilia nomo, estos kiel Frato Garolfi mia nova speciala amiko.

Trinità dei monti, l' aqua del vergine (placo de la virgulino), *Piazza di spagna*: Reen veninte ĉe la ĉiutagaj vivuloj tra la „via Sistina”, ni en malmultaj paŝoj alvenis ĉe la Piazza „S. Trinità dei monti”, iomete altigita punkto, de kie la unuan fojon ni vidis super la domaron de la eterna urbo. La ĉi tiea obelisko estas roma kopio de l' egipta ekzemplero ĉe l' „piazza del popolo”. La preĝejo S. Trinità dei monti estis fondita en 1494 kaj hodiaŭ kunigita kun knabina instituto. Iomete maldekstre en direkto de la Pincio (elparolu Pinĉo) la Villa Medici (elp. Médiĉi) nuna akademio franca (Accademia di Francia) de l' 1560. Pli poste ĝi estis propraĵo kaj loĝejo de l' kardinalo Ferdinando de Medici, la plimalfrua tria duko de Toskana. Depost 1801 ĉi tiu domo fariĝis sidejo de la franca pentrista akademio, fondita 1666 de Ludvigo XIV. Por mi estas speciale valora la penso, ke Galileo Galilei iam sin trovis ĉi tie, kiam li solvis kaj elparolis la enigmon de l' „e pur si muove” (t.e. „kaj tamen ĝi (la tero) sin turnas”). Tiu Parolo estas nun ankaŭ la solvo de nia esperanta lingva demando. Ankaŭ ni diras kontraŭ la antaŭjuĝoj multnombraj: „sed tamen ĝi marŝas”; antaŭen la esperanta movado kaj la tutmonda katolika unuiĝo, sub la signo de la kruco kaj de la kredo, kaj de nia internacia interkomprenilo.

En ĉi tiu senso ankaŭ oni antaŭen nin kondukis tuj en direkto al la „Via Aliberti”, la tielnomata granda „hispana stuparo”, preter la „piazza di Spagna”. Ĉe ĉi tiu lasta

placo certe vi vidis la kolonmonumenton de la „Immacalata” kiel memoro al la dogmatigo de la „senmakula koncepciono” de l’ 1854. La rilataj protokoloj ordinare sin trovas en vitra ujo en la sannoma kapelo de l’ vatikano. La tieaj librostabloj nur por la granda amaso da pilgrimantoj, okaze de nia ĉeestado, ne montrigis la librojn. Ĉi tuj lastaj lukse binditaj kaj la granda vitra librujo estas ambaŭ donacoj de la katolikoj franclandanoj. En la orienta flanko de la „piazza di Spagna” estis tre vidinde la palaco de la sidejo de la „kongregatio de propaganda fide.” Verŝajne nia kara S-ro Pastro Ĝeneralsekretario BIANCHINI estis antaŭ lia parolado pri „la misionoj katolikaj tutmondaj” ankaŭ tie por demandi, kion oni pensas *pri*- kaj atendas *de* „Esperanto” por la granda afero de l’ kristanigo pagana kaj nekristana ekster-europa mondparto. Por la skribanto ĉi tiu palaco havos ankaŭ ĉiaman memorvaloron, tial ke li ĉi tie antaŭ ses jaroj estis invitita al la pastra jubileo-festo de l’ kardinalo „papabile” Gotti. Kaj Vi en la lastaj semajnoj certe legis en ĉiuj gazetoj pri la „antiklerikalaj” faradoj de l’ malamikoj de la Roma eklezio kaj de ĉiu kristana kulturo. Nun en la „Via Aliberti” sekvis la paroloj de S-ro p-ro BIANCHINI pri la „katolikaj misionoj” kaj de l’ rekatolikiĝinta, eksanglikana pastro, S-ro MILSOM pri la katolikismo kaj la anglikana eklezio. Pri tiu labor-kunsido raportis jam aliulo.

* *
* *
* *

La Posttagmezo: bela, sed iomete varma Romana aŭtuntago, estis ĝuste kiel kreata speciale por ni kaj por nia celo, viziti S. Lorenzo’n fuori le mure” (ekster la urbmuoj). Gi estas unu el la kvin patriarĥaj preĝejoj de Roma, kiuj kun S. Croce kaj S. Sebastiano kune denombriĝas inter la sep ĉef-preĝejoj regule vizitataj de la pilgrimantoj. Kaj vere estas sankta ĉi tiu loko, kie unu el la unuaj kaj plej kruele martirigitaj sanktuloj mortis pro la konfeso de sia kredo al la Dieco de nia majstro kaj al la Diaeco de lia eklezio. Tial ankaŭ post la kruelaĵoj de l’ mondo li trovis la admiron de la tuta, viva eklezio de la postaj kaj ankoraŭ nunaj tempoj.

La unua parto de la preĝejo jam antaŭ la jaro 336 estis konstruita. Plimalfrue flanke de la tiama preĝejeto fariĝis monaĥejo, kies unua abato estis la pliposta Papo Hadriano I. En la jaro 720 kaj en la sekvintaj jaroj Hadriano konstruigis la ankoraŭ vidindan turon. Honorius III. zorgis por pligrandigo kaj plibeligo en la jaroj 1220—1225. En la lasta jarcento estis ĉi tiu preĝejo „la kardinal-preĝejo” de l’ granda Papo Pius IX. Li farigis ĝiajn lastajn renovaĵojn kun granda fervoro kaj granda sukceso. Nun la „Mariana Papo”, kiu kontraŭbatalis la atakojn de l’ ekleziaj malamikoj per la „Rosario en la mano”, ripozigis ĉi tien la morteban ĉirkaŭumon de lia granda spirito, post tiom da penadoj kaj la malfacilaj tagoj de lia glora pontifikado. Por li mem kaj lia monumento de l’ tombejo ne restis monon, tial li deziris, resti ankoraŭ post la morto la malriĉa malliberulo de l’ Vatikano, la malriĉa batalanta kaj venkanta kapo de la Roma eklezio. Sed vidinte la katolika mondo ĉi tiun privatan liberan malricecon de sia glorega Papo, ĝi spendis monon el ĉiuj terpartoj, landoj kaj urboj. Eble Vi memoros pri la granda amaso da insignoj de la diversaj donacintoj. Ĉiuj kvar muroj montras kaj montros ankoraŭ al venontaj jarcentoj kaj generacioj la senpartigitan amon de l’ katolika mondo por lia papo. Kaj estas despli bela kaj despli rimarkinda fakto ĉi tio, ju pli longtempe Pius IX. jam estas mortinta. La ama sindonemo de la kristana popolo por niaj papoj kaj por ĉiuj iliaj ordonoj ne ĉesiĝos ĝis la fino de l’ tempoj, kiam estos reanstaŭtota la papo, la videbla kapo de nia eklezio, per ĝia hodiaŭ al ni nevidebla mistika kapo Jezuo Kristo.

Kaj alian plian ironion de la opinioj de ĉiuj kontraŭuloj de l’ eklezio al ni rememorigas ĉi tiu papa tombo. Estas certe inter la legontoj multaj, kiuj post la morto de Pius IX, 1878, mem aŭdis la profeteman vorton de la malamikaro de la Roma eklezio:

„Estis la lasta papo”.

Kaj hodiaŭ? Kion ni scias hodiaŭ pri ĉi tiu profetaĉo? Ni scias, ke tuj post la morto de l’ glora Pius IXa estis elektita la grandulo Leo XIIIa. Kaj hodiaŭ la aminda kaj

ĉiuparte tiel ege estimata Pius Xa glore gardas la veron ricevitan de l' fondinto de l' eklezio Kristo. Kaj se iam — Dio donu, nur post tre multaj jaroj — nia Pius Xa, estos redoninta sian papan povon al la Sankta Spirito, nova papo prenos la remilojn de l' boato Petra.

Do — antaŭen! Ni havas ja bonan direktiston. Antaŭen kun kredo kaj fido: Antaŭen per kuraĝa laboro: —

Krom la marma sarkofago en la bela „Arkoloseum” de Pius IXa, nin altiras en la ĉef-ŝipo de l' preĝejo la „Ambon” (el la jaro 1250) kaj la „kripto”, ambaŭ la plej belaj modeloj de tiaj preĝejoj malnovaĵoj. La tuta interno de l' preĝejo cetere mirigas per ĝiaj pentrindaj perspektivoj. La tri ŝipoj de l' „antaŭ-preĝejo” estas partigitaj per 22 antikvaj kolonoj el diversa materialo („Cipollino” kaj granito); la kapitejoj alpartenas ankoraŭ al la konstruaĵo de Hadriano I. (720.)

Plie — por ne trouzi la paciencon de la legontoj — mi nur memoras ankoraŭ la tomban monumenton de l' kardinalo Fieschi (+ 1256.) Supre ĝi mezjarcenta „Tabernaklo” (sankta ŝranko”), kun diversaj pentraĵoj: Kristo, S. Lorenzo, Innocenco IV. kaj S. Stefano.

Apenaŭ foririnte el la sanktejo, ni renkontis amason da gebubaĉoj, kiuj nur en deŝiritaj ĉemiso kaj pantalono aŭ jupo vestitaj kun la mondkonata itala petadmaniero kaj bruego faris preskaŭ nekredeblan impreson. Kaj ĉi tiuj geknabaĉoj nin sur la tuta mallarĝa kaj malregula vojo ĉiam akompanis laŭlonge de la urbmuŝoj ĝis la „S. Croce in Jerusalemme I.”

Daŭrigota.

D-ro LEHNER.

Kroniko de I. K. U. E.

Du Sciigoj el Katalunlando.

I.

En malgranda vilaĝo de Ventallo', kiu kuŝas meze de la vasta kaj ĉarma Ampurdano, la plej bela ebenaĵo el Kata-

lunlando (Hispanujo), ĉe la detruaĵoj de la antikvega kaj historia Enporiono, ĵus okazis starigo de nova Katolika Esperanta grupo.

Pasintan dekokan de Decembro kuniĝis ĉe la paroĥestrejo iuj entuziasmaj kaj agemaj pro nia mondmovado junuloj, kiuj sub la prezidado de la paroĥestro pritaktis pri la grava afero, starigi en nia vilaĝeto esperantan grupeton. Post diskutadoj kaj venko de iuj bariloj, la kunvenantaro proponis kaj aprobis aldoni la nomon de „Flugila penso” al nia grupo kaj tuje elektis unuvoĉe la jenan komitaton: Prezidanto, Pasto PAŬLO PLANA Rektoro, Sekretario S-ro Benedikto CLOTAS, Vicsekretario F-ino Anita GUILLÉM, Kasisto S-ro Georgio BAGUER, Voĉdonantoj S-roj Jakobo RIBAS kaj Josefo CARBO.

Prezidanto proponis projekti katolikregularon kaj aliĝi al „Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj” kaj per ĝi al I. K. U. E. (aprobita). Fine per bruegaj aplaŭdadoj estas elektita Patronino de nia grupo la Sankta Virgulino de la Espero.

„Flugila Penso”, elaperante en la katolikaj bataladkampoj, firme decidas kunlabori por propagandi niajn idealojn, kunhelpi katolikan agadon kaj kunklopodi, por ke niaj esperoj estu baldaŭ efektivigitaj.

„Flugila Penso” alsendas fratajn kaj korajn bondezirojn al la tutmonda esperantistaro kaj bonvolemece respondos ciujn petotajn informojn rilate al nia lando.

II.

La grupo „Studenta Juneco”, starigita en la Seminario de Ĝerono, solenigis la feston de sia patronino, la Sankta Virgulino de la Espero. Matene oni diris sanktan Meson ĉe la bela Kapelo de la Espero en la Katedralo kun multnombra ĉeestado de geanaroj el Ĝerono.

Vespere la internuloj el la sama Seminario kuniĝis en la morallernejo kaj nia amiko Josefo PRATS eldiris interesplenan paroladon, belegan apologion pri nia kara help-lingvo. Per elokventaj vortoj li refutis kontraŭparolojn de niaj malamikoj, skurĝis grave la francan lingvon dirante,

ke ĝi nek estas, nek neniam estos vere internacia, kaj elpruvis majstre, ke nur Esperanto por sia simpleco, perfekteco, akcepto, facilega esprimado kaj pliaj aliaj ecoj, kiuj ĝin beligas, povas vere nomiĝi kaj esti internacia lingvo. Pro ĉi tio, li rimarkis, ke ni katolikoj estas devigataj kunhelpi ĝin, kaj kunklopodi por ĝia disvastigado inter niaj samcelanoj, neniel nek nenie ni devas timegi la ridindecon de tiuj, kiuj kontraŭbatalas nin, pro tio ke esperanto estas elpenŝaĵo de skismulo; do esperanto estas io neŭtrala, io sendependa, ĝi kontraŭdiras nenian ideon, nek politikan, nek religian, kaj Lia Papa Moŝto Pio X-a ne nur ĝin aprobas, sed ankaŭ bone diris, ke esperanta entrepreno promesas feliĉan estontecon por la Katolika Eklezio. Li finis sian belan apologian paroladon per jenaj vortoj: „Se framasonoj estas akceptintaj Esperanton, deklarante ĝin oficiale internacia por sia sekto, ĉi tio sufiĉe pruvas, ke per ĝi, ili povas tre facile interkompreniĝi kaj mirinde propagandadi siajn idealojn. Ĉu ni katolikoj povos forlasi al ili, aŭ pli bone forĵeti tiun armilon tiel potencan, kiu sammaniere kiel ĝi povas taŭgi al ili, tiel ankaŭ povas taŭgi al ni por kontraŭstari ilian propagandadon nekatolikan kaj ateistan? Neeble! Ĉi tio estus io malhonora por nia Sankta Kredo”. Dum sia parolado kolektis nia amiko varmajn aplaŭdadojn.

Pastro PAŬLO PLANA, Paroĥestro.

DIVERSAJ KOMUNIKOJ.

Estas nuntempe vere ĝuado vivi kaj spiri en I. K. U. E.-lando. Ĉie — kiel, post mortŝajna vintro, en printempo — burĝonas la kreskaĵoj kaj oni kulturas la kampojn, jen plugante, jen semante, jen rikoltante la printempajn legumojn kaj florojn. Kian riĉan promeson por la somero kaj la aŭtuno enhavas tia ĉie burĝonanta vivo kaj sindona laboremo!

Se Patro RICHARDSON farus al ni la plezuron sendi leteron el la ĉielo, ho! kiel gaje kaj ĝoje li priskribus tiun

esperigan kaj sukcespromesantan agadon en nia I. K. U. E. Li, kiu montris jam kontentecon kaj dankemon pro ĉiu plej malgranda apogo kaj klopodo por sia Unuiĝo, entuziasme laŭdus la fervoron kaj agemon, kiu nuntempe regas en I. K. U. E.

Estas ankaŭ por la redaktoro ĉiutage festo, esti atesto de tiu ŝprucanta vivo en nia kara movado. Tamen li sentas sin kvazaŭ birdeto en kaĝo, kiu ja povas flugetante movi sin en sia mallarĝa loĝejo, sed kiu dezirus libere eletendi siajnflugilojn por, laŭ bontrovo, sin movi en malpli limigita spaco — li havas nur 32 paĝojn kaj 8-paĝan kovrilon (aŭ 36 paĝojn kaj 4-paĝan kovrilon) je sia dispono; ĉar pro la malalta abonprezo pligrandiĝo de E. K. estas neeble tiel longe, ke la abonantaro ne estas sufiĉe grandnombra.

La jaro 1914 estos tre grava por Esperanto ĝenerale kaj por I. K. U. E. speciale. Okazos granda Universala Esperanto-kongreso en Paris, kaj — laŭ ĉiuj antaŭsignoj — ankaŭ grava katolika kongreso en Lourdes. Verŝajne — se oni en Esperantujo estu prudenta kaj vigla — 1914 estos decida paŝo antaŭen al la fina triumfo de Esperanto. Almenaŭ ni, Katolikaj Esperantistoj, ne forgesu helpi nian propran kongreson per nia aliĝo kaj pluaj apogoj, precipe per nia propra ĉeesto.

La „**Enketo de Espero Katolika**” konigis al ni interesajn detalojn pri la Katolikaj Ligoj kaj Grupoj. Mi esperas, ke ankaŭ Bavarujo, Belgujo, Francujo, Skotlando kaj multaj aliaj landoj baldaŭ respondu. En la proksima numero de E. K. ni donos la jam ricevitajn kaj ricevotajn respondojn.

Specialan ĝojon kaŭzis al mi la **reapero de „l' Espérantiste Catholique”** en Francujo, kiu „filino ne estis mortinta, sed nur kelkatempe dormis”, laŭ la sprita rimarko sur la kovrilo. La gazeto, redaktita ĉefe en Franca lingvo, estis ĉiam plej interesa, kaj la ĵus aperinta numero estas tre riĉenhava. Direktoro estas CL. COLAS, sekretario de la redakcio MAX ROUB, kaj la abonprezo por eksterfrancanduloj estas 2 frankojn (7, rue des Marronniers, 7 — Montmagny (près Paris), France. — Kontraŭe al la opinio de

kelkaj, mi opinias, ke naciaj Kat. Esp. gazetoj estas necesegaj pro diversaj motivoj kaj anstataŭ konkurenci kun la internacia organo, ili estas plej granda apogo por nia tuta movado. Tiujn motivojn mi volonte dezirus detale montri kaj pravigi, sed mi devas esti mallonge.

La **Katolika Grupo en Parizo** kunvenos de nun en *l' Hôtel des Oeuvres diocésaines* (76, rue des Saints Pères) apartenanta al la ĉefepiskopejo kaj ĝoje metita je dispono de la grupo de Lia Kardinala Moŝto AMETTE.

Naskiĝo de novaj Esperantistoj estas eble same grave kiel varbado de novaj Esperantistoj. Kio ajn pri tio estas, naskiĝis fileto al gesinJORAJ COLAS, al gesinJOROJ SMULDERS, kaj espereble al multaj aliaj Esperantistaj geedzoj.

Ankaŭ ni povas anonci **edziĝon** de katolikaj Esperantistoj. S-ro Edwin MILSOM kaj F-ino M. CAUVIN, la unu tre fervora, la alia tre ĉarma Romaj kongresanoj, interkonatiĝis dum „Nia Kvara”, kaj ilia ekamo estis favorita per la beno de la Sankta Patro. 22 Januaro 1914 okazis la feliĉa edziĝofesto. Ni kore gratulas kaj bondeziras ilin.

Bedaŭrinde ni devas ankaŭ anonci gravan perdon:

Kapitano Th. C. VAN ERP. †

Tiu ĉi fervora Katoliko kaj Esperantisto estis estrarano (kasisto) de la Nederlanda Katolika Ligo Esp. Kvankam li tre malmulte laboris sur internacia kampo, li tamen laboris tre multe por la Nederlanda Ligo kaj tie ĉi li estis tre amata kaj respektata samideano. Sprita oratoro li estis, kiun oni ofte invitis por paroladi; kaj ofte la kunvenejo skuĝis pro gajeco kaj ridado, kiam li ŝerceme kaj sprite bonhumorigis eĉ la plej seriozan el la aŭskultantoj. Tiuj kunvenoj estis ĉiam sukceso por Esperanto. Sed subita morto post grava operacio metis finon al tiu meritplena vivo. Ni kore kondolencas lian estimatan edzinon kaj infanojn. Ripozu nia simpatia kunbatalanto en paco!

D-ro SMULDERS.

Katolika Vivo Ĉiulanda.

TRA LA MONDO.

Antaŭparolo. Ĉi sube ni donos ĉiumonatajn raportetojn pri la bon- aŭ malbonfarto de nia amata Eklezio-patrino. Ni volas, ke nia altŝatata gelegantaro vidu per tiuj ĉi raportoj la nuntempan historion de l' Eklezio kvazaŭ per malgrandiga spegulo. La raportojn kolektadas P-ro KOZMA (Hungarujo), sed nepre mi publikigos ankaŭ aliajn raportojn, se ili konvenas al la jena devizo: ili estu gravaj (mondinteresaj), veraj kaj — mallongaj.

Decembro.

Romo. *La libereco de l' Papo.* Okaze de la malfermo de la „Sociala Semajno” en *Milano*, la 1-an decembro ĉefepiskopo de *Udine*, M-sro Anastasio ROSSI havis gravan paroladon, laŭdire aprobatan ankaŭ de la *Vatikano*. Li diris i. a. la jenajn: „La libereco de plej ĉefa pastro de l' dia Eklezio” devus esti ne nur frazo, sed prava fakto... La formo, kiu garantiadis pri la libereco de l' papo dum pli ol miljaro, estis la laika regno de l' papoj... Ĉu ne estus eble, ke... la Providenco designis (nun) alian formon de l' libereco kaj sendependeco por la Eklezio?... La libereco de l' papo ne devus esti elpetita, sed konstanta kaj netuŝebla.” La itala regno ne povas garantii pri tio, do oni devas serĉi internaciajn garanti-aĵojn. — Kelke da ĵurnaloj konkludis el la parolado, ke la papo volas abdiki je la reĝa potenco, kaj lasi la principon „Non possumus”. Kompreneble ili ne pravas.

Kardinalo Oreglia mortis. La Nestoro de l' kolegio de kardinaloj, M-sro OREGLIA DI S. STEFANO mortis la 5-an de decembro en *Romo*. Li estis kardinaligita ankoraŭ de *Pio IX*. En 1858 li estis papa internuncio en *Hago*, en 1866 li fariĝis nuncio en *Bruselo* kaj poste en *Lisabono*. Ĝis la morto li estis „major domus” kaj tre sindona al la politikaj principoj de *Pio IX*.

Rampolla ankaŭ mortis. Kardinalo MARIANO RAMPOLLA DE TINDARO mortis la 17-an de decembro. Per lia morto la nombro de l' kardinaloj fariĝis 56. De 1882 li estis papa nuncio en *Madrid*. Post la morto de JACOBINI (1887) li fariĝis ŝtatsekretario. Post la morto de LEONO XIII li estis elektota papo, sed post kiam ĉefepiskopo de *Lemberg*, M-sro PUZYNA raportis la kontraŭdiron de l' reĝo Francisko Jozefo I, li oferis sin, kaj abdikis je la plej alta estreco.

Beatdeklariga proceso de P. Le Nobletz. En la apostola palaco de Vatikano, la 14-an de decembro estis legita la dekreto de papo, kiu konstatas, ke Rev-a P. LE NOBLETZ, misiisto de *Bretagne*, havis la plej altan gradon de l' diaj kaj moralaj virtoj. Per tiu fakto la unua parto de l' beatiga proceso finiĝis.

Aŭstrio. — *Propagado de l' malkredo.* Dum la lastaj monatoj la fama *kontraŭ-lourdesulo*, D-ro AIGNER, havis paroladojn en multaj urboj, por rifuzi la miraklojn, kiuj en Lourdes-o (kie okazos Nia Kvina) okazis. Post liaj paroladoj ĉie ekparolis gravaj scienculoj, kaj rifutis liajn kontraŭkredajn kalumniojn. Precipe la paroladoj de D-ro UDE, GATTERER S. J., D-ro EHRLICH kaj D-ro SOMMEREGGER tute senprofitigis la agadon de D-ro AIGNER. Kaj dank' al Dio tiu ĉi agado pli estis utila al la kredo ol al D-ro AIGNER.

Azio. — *La defendado de l' misiejoj.* La prezidanto de *Hinujo*, S-ro IUANSIKAI ordonis, ke la gubernestro de *Tokia* persekutadu la rabistojn, kiuj atakis kaj bruligis la kristanajn preĝejojn kaj misiejojn. La oficistoj, kiuj ebligis, ke tiaj krimegoj okazu, la prezidanto ordonis abdikiĝi.

Nova malsukceso de l' teozofoj. En 1911, kiam la doktrinoj de LEADBEATER komencis progresiĝi en *Hindujo*, D-ro NAIR publikigis artikolon en la kuracista revuo „Antiseptic” pri la teozofoj. La alia gazeto: *Hindu* represigis la artikolon kaj eldonis ankaŭ en aparta broŝureto. S-ino BESANT, la profetino de l' teozofoj, komencis proceson pro kalumniado kontraŭ tri eminentuloj: D-ro NAIR, D-ro RAO kaj kontraŭ la eldonisto de l' „*Hindu*”. La proceso malsukcesis, kaj la pastrino devis forlasi Hindujon. La profesoroj de l' teozofista universitato en *Benares* abdikis je siaj katedroj, ĉar estis malkaŝita la sekretaĵo, ke ili devis varbi adorantaron por la „patrino” S-ino BESANT, „la estonta ĉefo de l' homoj kaj dioj”. La gazetaro publikigas akrajn artikolojn kontraŭ la teozofistoj.

Katolika universitato en Japanujo. La Japana registaro rekonis la rangon de universitato de la jezuita ĉeflernejo en Tokio. La nova universitato konstruiĝos proksime la imperiestra palaco.

Balkano. — *La katolikema Bulgarujo.* En aparta artikolo ni rakontis, ke en Bulgarujo estas movado por la reunuiĝo. Pri la movado iu eksministro diris la jenajn: „La movado estas tre serioza: ĝi atingos sian celon frue, aŭ malpli frue... Bulgarujo simpatias kun Romo jam de longe. Tri fojojn ĝi provis unuiĝi kun tiu, la unuan fojon Bizantio, la duan fojon Rusujo malhelpis tion... Ĉiujn kaŭzojn ni havis por katolikiĝi.” La „*Veĉerna Poŝt*” skribis la jenajn: Kristo starigis nur unu solan Eklezion, kaj tiun li bazis

super S. Petro... Ĉar S. Petro ne estis senmortulo, estas lia porĉiama posteulo la episkopo de Romo. „Al ni ne restas io, escepte ke ni iru denove al nia malnova Patrino, al la katoliko Eklezio... Tiu Eklezio estas internacia, kaj ne ruinigas la naciojn.”

Francujo. — *La nova registaro* konsistas preskaŭ tute el radikalaj partianoj. La ministro do publika instruado S-ro VIVIANI, estas plej akra malamiko de l' katolikoj.

Kontraŭ la pastroj. La parlamento voĉdonis leĝon kontraŭ la pastroj, kiuj klopodas persvadi la gepatrojn, ke ili ne instruigu la gefilojn en senreligiaj lernejoj. La leĝo ordonas monpunon kaj arestigon dumonatan por tiuj „malamikoj de l' popollernejoj”.

Germanujo. — *Malpermesitaj spiritaj ekzercoj.* P. MILOCH S. J. volis havi spiritajn ekzercojn por servistinoj en *Posen*. La polico tion malpermesis. S-ro MOROWSKI parlamentdelegito tial interpelaciis al la kancelaro de l' imperio. Anstataŭ la kancelaro D-ro CASPAR promesis, ke la afero estos severe ekzamenata.

Granda Britujo. — *Lordmajoroj en la katolikaj preĝejoj.* La antaŭlastan dimanĉon de novembro la unuan fojon okazis, ke Mr. CABE, lordmajoro de *Manchester*, oficiale partoprenis en la katolika meso en preĝejo „S. Nomo”. La saman vesperon li partoprenis en la diservo en katedralo *S. Patriko*. La saman tagon la lordmajoro de *Worcester*, Aldermann H. A. LEICESTER ĉeestis la sanktan meson en la katedralo *S. Georgio*. — Por ke oni komprenu la signifon de la rakontitaj faktoj, ni devas sciigi, ke en Anglujo ankoraŭ valoras la leĝo malnova, ordonanta mortpuni la pastron, kiu kuragis legi la S. Meson. Dank' al Dio, ĝi estas jam nur papera leĝo.

Hispanujo. — *Manko je pastroj.* En Hispanujo minacas manko je pastroj. En jaro 1883 troviĝis 18, 397 da seminarianoj (entute), en 1913 nur 6998. La episkopoj kunvenos por pritrakti la malgajigan aferon.

Hungarujo. — *La katolika Papolligo* havis sian jarkunvenon en *Eperjes*, la 8-an de decembro. La nombro de membroj estas 297,340 (+ 6120 ol en 1912). La centra oficejo eldonis 115,172 da aktoj aranĝitaj. Oni aranĝis 1350 da kunvenoj, disdonis 5,257,310 da broŝuroj, la Popoloficejo aranĝis la aferojn de 18,430 altturnintoj, la ligantaj advokatoj donis senpagajn konsilojn en 18,430 okazoj. La jara elspezo estis 228,121,14 koronoj (95,126,52 Sm.)

Konvertiĝoj en 1911. Ĵus aperis la statistiko oficiala pri 1911. La latin-katolika eklezio gajnis 794 da neofitoj, la greko-unuiĝinta (katolika) malgajnis 164; do la katolika eklezio gajnis entute 630 da animoj. La nombro de konvertiĝoj de 1896—1911 estis **19969**.

Italujo. — *Franciskano en profesora seĝo.* Estas tre malofte en Italujo, ke pastro estu nomita kiel profesoro. Despli ĝoje ni raportas, ke P. GEMELLI O. S. F. fariĝis profesoro de l' universitato en *Torino*. Li prelegadas pri la eksperimenta psiĥologio. P. GEMELLI estas fama apologiisto, kiu verkis multajn naturscienc-apologiajn verkojn.

Portugalujo. — *La kontraŭeklezia agado.* La registaro raportis, ke 618 protestoj okazis kontraŭ la forrabo de l' ekleziaj bienoj. 251 da kazoj estis rekonitaj, 334 rifuzitaj. En 33 da kazoj la *Haag-a* pacjuĝistaro pridecidos.

Rusujo. — *Arestita pastro.* S-ro GIERS, la gubernestro de *Minsk* arestigis la katolikan pastron P. MILASCHEVSKI, ĉar li „faris prose-litojn”. La registaro aprobis lin, sed la pola parlamentdelegito S-ro SVJENZIZKI proponis, ke la parlamento eldiru la malaprobon, kiu vere estis voĉdonita per 161 voĉoj kontraŭ 117.

La rusa eklezio kontraŭ la forbruligo de l' mortintoj. La rusa komercisto S-ro VEJSMAN mortis en Svisujo, kaj lia kadavro — laŭ deziro de l' vidvino — estis forbruligita. La vidvino volis en Rusujo enterigi la cindrojn, sed la pastro neis la ekleziajn ceremoniojn. La ĉefepiskopo de *Kursk*, kaj ankaŭ la S. sinodo aprobis la agon de l' paroĥestro, sed permesis kanti meson kaj „panaĥidon” („Libera”) por la mortinto.

Svisujo. — *Horego en altoj al Dio.* Multe da turistoj vizitas la belegan alpon *Monte Generoso*, kiu staras inter la lagoj de *Lugano* kaj *Como*. Tial oni konstruos katolikan preĝejon sur la monto apud la Hotelo BELLAVISTA. La preĝejo estos pretfarita laŭeble dum la somero 1914. Do la piaj turistoj povos glordiri al Dio ankaŭ en la alto.



Januaro.

Romo, — *La dalreveno de naskiĝtago de l' papo.* Okaze de la datreveno de lia naskiĝtago Lia S. Moŝto Pio X. akceptis la salutojn de l' kardinaloj la 24-an de decembro. Post la soleneco la papo daŭre interparoladis kun la ĉeestintoj pri la novaj aferoj de l' Eklezio.

La sukceso de la Konstanteno-jubileo. Dum la unuaj tagoj de decembro finiĝis en Romo la Konstantenaj solenecoj de jubileo. Unu el la liberalaj ĵurnaloj de l' Supra Italujo skribis la jenajn pri la sukceso de l' jubileo:

„La komercistoj havis grandajn gajnojn en Romo. Laŭopinie *pli ol 800.000 da pilgrimantoj vizitis Romon dum la jubilea jaro, kiuj*

elspezis en Romo pli ol 12 milionojn da liroj (Sm. 6 milionoj) Sed super ĉio meritas gravan atenton la granda religia sukceso, kiun Pio X atingis. Kiu volis havi ĝustan sperton pri la religia piemeco de l' amasego sennombra de l' pilgrimantoj, tiu devis nur atenti, kiel ĉiurangaj kreduloj de l' tutmondo vizitis la *bazilikojn* longe distarantajn unu de l' alia. Tiu devis ilin vidi okaze de la papaj aŭdiencoj, kaj ĉeesti okaze de la komunaj S. Komuniigoj, kiuj ne povas esti elparoleblaj en numeroj. Ili estis vere kormovaj agoj de l' kredo kaj pieco."

Ni devas ĝoji, ke ankaŭ nia modesta pilgrimo iom aldonis al la sukceso de l' neforgeseblaj festotagoj.

Jubileo de l' kardinal-ŝtatsekretario. La 1-an de januaro estis la 25-a datreveno de l' paŝtrigo de M-sro MERRY DEL VAL. La jubileo okazis — laŭ la dezirego de l' kardinalo — sen iu soleneco. Sole la papo gratulis lin en kora letero.

La nova „Annuario Pontificio” aperis precize la 1-an de januaro. La unuan ekzempleron la redaktinto *Procaccini di Montescaglioso* la saman tagon prezentis al Lia S. Moŝto. Laŭ la sciigoj de l' jarlibro Pio X estas la 259-a el posteuloj de S. Petro, kaj estas 79 jaraĝa. La s. kolegio de l' kardinaloj konsistas el 55 kardinaloj (5 episkopaj, 43 presbiteraj kaj 7 diakonalaj kardinaloj), unu kardinaleco estas rezervita „in petto.” Laŭ nacieco Italujo havas 30 da kardinaloj, Francujo 6, Hispanujo 4, Aŭstrio 3, Hungarujo 2, Nord-Ameriko 3, Gr. Britujo kun Irlando 2, Germanujo, Holanda, Portugalujo, Sud-Ameriko, Belgujo havas po unu. La plej grandan aĝon el kardinalaro havas DI PIETRO (86 jarojn). La plej juna estas la ŝtatsekretario MERRY DEL VAL (48 jara). La Eklezio havas entute 14 da patriarĥaj, 208 da ĉefepiskopaj, 847 da episkopaj landoj. Ekzistas 546 titolaj episkopejoj, 12 apostolaj delegitoj, 164 apostolaj vikarioj, 65 ap. prefektoj kaj 22 da eparĥioj subordonitaj senpere al la ap. Seĝo. Daŭre de l' ĝisnuna regado de Pio X fondiĝis 18 ĉefepiskopejoj, 53 episkopejoj, 37 vikariejoj, 34 prefektejoj kaj 4 eparĥioj senpere sub la S. Seĝo.

La reformo de l' kalendaro. La komercistaro de kelkaj landoj fervorege agadis, ke la festotago de l' S. Pasko estu fiksita al unu definitiva dimanĉo de aprilo. La papo ordonis, ke aparta komitato ekzameni la aferon. La komitato decidis daŭrigi la ĝisnunan kutimon fiksitan de l' I sinodo Nikea, kiu ordonis festi reviviĝon de Kristo la unuan dimanĉon post la unua plenluno post 21 de marto.

KOZMA.

Daŭrigota.